Universala Esperanto-Asocio

**AKTIVULA MATURIGO** ktp

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-32 sendita el Budapeŝto, la 24an de novembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# AMO ĝis marto: 4 seminarioj en tri monatoj

Okazis en 2017 jam dek seminarioj pri Aktivula Maturigo (AMO); restas du:

**AMO 40** okazos en Moskvo en la 3-a de decembro, kadre de la 11-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo. Temos do pri unutaga seminario.

**AMO 41** okazos en Parizo en la 9-a kaj 10-a de decembro, tuj antaŭ la festado de la fino de la Zamenhofa jaro ĉe Unesko.

En la januara numero de *Esperanto* aperos la kutima resumo pri la programo tra la lasta jaro. Legeblos tie pri la 12 seminarioj okazintaj en 2017.

**AMO 42** okazos inter la 12-a kaj 14-a de februaro 2018, kadre de la 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en Havano, Kubo okazonta inter la 11a kaj 17a de februaro. Pri TAKE legu en la oktobra revuo *Esperanto* sur p. 201. La temo de AMO estos: 'Lingvo kaj kulturo: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj.' Gvidantoj estos Javier Ramos Nistal, Julián Hernández Angulo kaj pliaj personoj.

**AMO 43** okazos inter la 20-a kaj 22-a de februaro kadre de APERO 12, aranĝo de la Rusia Esperantista Unio (REU) en urbo rande de Moskvo. La temo estos 'Modernigo kaj junigo de la E-movado'. Gvidantoj estos Irina Gonĉarova, Stefan MacGill kaj aliaj.

Post tio estas kelkaj proponoj en la vico, sed antaŭtempas jam nun anonci ilin.

# Denove, Azio kaj Oceanio kune

Tre bonvena estas la delonga kunlaboro inter Aŭstralio kaj Indonezio – landoj kulture tre malsamaj sed geografie ne tiom malproksimaj (aŭstralianoj havas aliajn ideojn pri distancoj ol ni plietlandanoj). Antaŭ du jaroj okazis la ege sukcesa Trilanda Kongreso, kune organizita de la landaj movadoj de Indonezio,

Aŭstrialio kaj Nov-Zelando. Konforme kun la decido tie, la Dua Trilanda Kongreso okazos en 2018, denove en Indonezio. Jen komencaj informoj:

**Loko:** Bekasi, Indonezio, Hotelo Horison.

**Dato:** 28 Marto – 2 Aprilo 2018

**Adreso:** JI. KH. Noer Ali, Kayuringin Jaya, Bekasi Sel., Kota Bks, ID-17148 Jawa Barat

**Telefono de la hotelo:** +62 21 3002 8500

**Komenco kaj fino:** La unua ero estos vespera kunmanĝado merkredon la 28-an de marto, la lasta ero estos la matenmanĝo lunde la 2-an de aprilo.

**En la programo:** klasoj de Esperanto je du niveloj, vespero de teatro kaj muziko. Esperanto-ekspozicio, bankedo, ekskursoj, babilado, ridado, prelegoj pri Esperanto kaj aliaj temoj, jarkunveno de AEA, koncerto de Zhou Mack Mafuila.



**Ekskursoj:** La antaŭkongresa ekskurso estos en **Anyer**, la 23-an ĝis la 27-a de marto. La programo ĉefe temos pri marbordaj aktivaĵoj kaj la vulkano Krakatao. La post-kongresa ekskurso okazos en **Bali**, de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo 2018 kun decidota programo.

Foto: Infanoj ricevis librojn de la esperantistoj en la antaŭkongresa ekskuro de la Trilanda Kongreso en 2016 sur insulo Pari. Foto: smg

**Kongresaj detaloj:** http://aea.esperanto.org.au/kongreso/?lang=eo

# <Aktivulo.net> kreskas

La retejo de UEA de kaj por aktivuloj kreskis. Ĉe la unua indekso “Agadaj Raportoj” vi trovos la plenan kolekton de EKO-komunikoj ekde 2014 ĝis nun. Do, legeblas la ilustritaj versioj ĝis la 31a komuniko. Vi havas du elektojn: “Malfermu en braŭzilo” (legu ekrane) aŭ “Elŝutu PDF”, por ke vi havu la komunikon en via loka komputilo. La PDF-dokumentoj estas nepezaj, tre malofte ili plias ol 1 MB.

La 6a FLAM-analizo el la 4a Sud-Azia Seminario nun aperas en la retejo, ĉe “Pliaj projektoj > FLAM”. Tre baldaŭ aperos bazaj informoj pri ĉiuj AMO-seminarioj de 2017.

# Eŭropa bulteno: la plej freŝa numero

Ĉi tie ĝi legeblas: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno

Jen la temoj:

1 Preparo de la konferenco de la kvar Visegrad-landoj (HU, SK, CZ, PL) pri edukado por eŭropa civitaneco

2. Komenciĝas preparlaboroj por la kongresoj 2018
3. Asembleo de EEU en Lisbono
4. Ekspozicio "Translation matters" en EESK/KdR
5. Ekzempla agado de modestulo
6. Britio bezonas pli da lingvistoj en postbritelira fazo de la evoluo
7. KER-ekzamenoj ĉe la itala E-kongreso, San Marino 2018
8. Internacia kalendaro
9. Internacia renkontiĝo de E-verkistoj en Kroatio
10. La 14a Rata Renkontiĝo en Hameleno (Germanio)

# Du universitataj seminarioj en Tehrano




La 30an de oktobro 2017 okazis duhora libera seminario pri Esperanto en la universitato *Allame Tabatabai* en Tehrano kun s-ro Ahmadreza Mamuduhi. Partopreno en la seminario estis libera. Vidu foton en la PDF-versio.

Dua seminario okazis la 7an de novembro 2017 en la universitato *Pajeme Nur* en la okcidenta parto de Tehrano. En ambaŭ universitatoj jam okazas bazaj kursoj.

Raportis: Simin Emrani

# Klimata ŝanĝo esplorita

En la 16a de novembro la israela televido elsendis intervjuon kun Amri Wandel pri la klimata varmiĝo kaj la tiurilata lastatempa aserto de Steven Hawking. La intervjuo estas rete spektebla che http://www.23tv.co.il/1455-he/23dakot.aspx, ĉapitro 377, minuto 11:30.



Vortoj = 725

=====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.